nia voĉo

madrida esperanto-liceo decembro 2015

## PLANADO POR LA ZAMENHOF-TAGO

Por celebri la datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, MEL luprenos aŭlon en la kultura centro *Centro Sociocultural Mariano Muñoz* dum la sabato 12a. Ĝi troviĝas en la kvartalo Usera, strato Cristo de Lepanto, metrostacio Almendrales.

Ni disponos la lokon ekde la 11a matene ĝis la 7a vespere. La programo pretiĝos post kelkaj tagoj; ĝi certe enhavos kelkajn prelegojn, prezenton de novaj libroj, ludojn, ktp.

Eblos tagmanĝi en la kafejo de la centro; la tag-menuo kostas 8,50 € kaj konsistos el lentoj kaj fileo, alternative salato kaj omleto, sen plia elekteblo.

Je la 20a horo en la teatrejo de tiu centro prezentiĝos la teatraĵo CLUEDO fare de la ensemblo Trecegatos: http://trece-gatos.blogspot.com.es/. La eniro kostas 8 €. Por spekti la teatraĵon necesas anonciĝi ĉe Manolo Parra (manolo punkto parra ĉe yahoo punkto es), por rezervi la biletojn sufiĉe frue, kaj same por partopreni la diritan komunan tagmanĝon. Same kontaktu min se vi emas prezenti programeron.

Pliaj informoj venos; restu atenta.

## BALDAŬA ELDONO DE "BOHEMIAJ LUMOJ"

Kiel ni komentis antaŭ kelkaj monatoj, MEL debatis pri la ŝanco eldoni la tradukon de la konata teatraĵo de Valle-Inclán "Bohemiaj Lumoj". Oni komence proponis la eldonon fare de konata esperanta eldonejo, sed tiu projekto ne efektiviĝis, kaj nun aperis la ebleco ke MEL mem zorgu pri la afero.

La estraro aprobis la eldonon kaj ĝi aperos tre baldaŭ, probable dum tiu ĉi monato decembro.

## MADRIDA MAGISTRATANO AŬSKULTAS POEMOJN EN ESPERANTO

La internacia junulargastejo San Fermín, de Madrido, estas konata de ni esperantistoj pro la simpatio montrata de ĝiaj gvidantoj al nia afero. Tie okazis i.a. la 9a IRo (Iberia Renkontiĝo) en 2013. Ankaŭ la najbaroj de la kvartalo San Fermín rigardas la gastejon aktiva centro de kultura agado. Unu el la plej malnovaj, konstantaj kaj fervore probatalataj depostuloj de la najbaroj estas la kreo de biblioteko, kion antaŭaj aŭtoritatoj neglektis.



Nun la nova magistrato aprobis la kreon de la sopirata biblioteko, destinante monon por la projekto. Por prifesti tiun bonan novaĵon, la najbararo aranĝis modestan sed vibroplenan feston. La 22an de novembro, ĝuste sur la parcelo, sur kiu oni konstruos la bibliotekon, pluraj muzikistoj, kantistoj kaj poetoj faris prezentojn. Inter ili, nia poeto Miguel Fernández deklamis kaj kantis kelkajn poemojn en la hispana kaj en Esperanto.

Ok esperantistoj ĉeestis inter la publiko. Por la unua fojo post pli ol dudek jaroj da batalado por ke oni kreu bibliotekon en la kvartalo, venis oficiala reprezentanto de la madrida magistrato. Temas pri Celia Mayer, magistratanino pri kulturo. Ŝi vere gapis aŭskultante Miguel deklami kaj kanti en Esperanto. Sendube, per tiu ĉi agado ni trabatis al ni la vojon por iniciati interesajn rilatojn kun la nuna madrida magistrato.

## TEJO REPREZENTITA EN MADRIDO

Saŝa Murr vizitis Madridon de la 26a de novembro ĝis la 1a de decembro. Ŝi, kune kun la prezidanto de TEJO kaj tiu de la ĉeĥa esperanta junularo partoprenis en Forumo de Eŭropaj Junularoj okazinta dum tri tagoj Madride. Tie TEJO povis defendi la lingvajn rajtojn dum rezolucioj kaj babilrondoj kaj same kundividi opiniojn kun aliaj organizoj. Kompreneble ili ofte klarigis amike pri nia pontlingva alternativo uzata de esperantistoj kaj substreke de TEJO. Fruktodonaj rilatoj estis kreitaj por plufirmigi ilin ĉe la venontjara Forumo.




Dimanĉon kaj lundon Ŝaŝa pasigis en Madrido por iom turismi, gastiĝante ĉe Alex kaj Andy. Ŝi profitis por viziti pri-klimatŝanĝan manifestacion kie hazarde ŝi renkontiĝis kun Manolo kaj Ana. Lunde ŝi povis viziti kaj kunveni kun MELanoj kiuj troviĝis en la sidejo kaj donacis al ŝi etan esperantan memoraĵon. Ŝi foriris marde fine al Londono kie ĉi tiu energia esperantisto el Krimeo loĝas de pluraj jaroj.

## KROME VIZITAS NIN

Eddie el Marseille loĝas nun en Madrido dum 6 monatoj. Male, nia amiko Heroo plej verŝajne baldaŭ reiros al Koreio kaj tie restos. Ankoraŭ eblos revidi lin, verŝajne dum Z-tago.

Davido, sevila samideano kiu loĝas kaj laboras en Ateno ekde julio, trapasos Madridon por viziti sian familion en Sevilo dum kelkaj tagoj. Li estos en Madrido la unuan ĵaŭdon, la 3-an, ekde 20h ĝis 23:30. Se iu povas noktmanĝi kun li, bv. kontakti kun nia redakcio.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. Notu tamen ke la monato decembro estos speciala: oni ne malfermos la sidejon la 7an de decembro (pro la *ponto*) kaj ankaŭ dum la kristnaskaj festoj la malfermo verŝajne estos malregula.

La sabata babilado okazos la 5-an de decembro, verŝajne je la 6-a en benjetejo (*churrería*) Valor, strato Ibiza (metrostacioj Goya, Sainz, Ibiza, O'Donnell), sed atentu la forumojn por konfirmi.

Por esti informitaj pri la novaĵoj de la movado en Madrido kaj aliloke, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel kaj la retan diskutliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com